

& Infana balado:

< Rekante 19 el 27 batoj por strofo, entute 540 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Bohemaj grenatoj) dediĉe al Jan Neruda. Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Filino de Torkil.>

(#Melodio:

<1,7:27> (

/sodo dodo rere sooso;so somi; soso soso fami remi; fa mimi re do; rere rere rerere
soso somi; soososo soso faamimi remi; fa mimi re do o

)×20)+

(&Strofoj:

'1 Eldormetis la patrino,

(×: – **ja danci** –)

konsternita la infano.

(×: – **Bone min ŝancis, ; jen mi volas plankon antaŭen danci, ; kvankam vi mian vivon minacis, ; bone min ŝancis.**)

'2 Ĉe piedoj ĝiaj sidas pala Mort'
kaj je ĝi ridas

'3 Sur la korpo la girlando, blankaj
floroj kun rubando,

'4 kaj en ĝia mano io, kiel ret' por
papilio.

'5 Manoj kvazaŭ bastonetoj, manoj
kvazaŭ bastonetoj

'6 frunto ĝia – vaksa flavo,
okultruoj – sen enhavo.

'7 "Venu al mi, infaneto, ni ekludos
en sekreto,

'8 ĉe la lumo nokta, stela, ĉe
muziko plej anĝela

'9 ĉe muziko plej anĝela ni
ekdancos – paro bela."

'10 "Ne permesas patrineto kaj
doloras la korpeto."

'11 "Ho, nur iru, kolombino, ho, nur
iru, kolombino.

'12 La malsanon, kiu tenis vin, mi
preni de vi venis

'13 kaj ni povos ambaŭ kune en
ĉielon flugi nune."

'14 "Ne, ho ne, for, mi vin petas,
patrineto nur dormetas."

'15 "Levu vin nur, infaneto, sendas
min la Jezuleto,

'16 eĉ reĝino de l' ĉielo, vin
gardanta gardanĝelo.

'17 Vi ekvidos ĉion brili, ĝis vi
estos inter ili."

'18 "Do ni iru, sed singarde,
patrinet' ĵus dormas harde.

'19 Io koron ŝian premas, jen ŝi
ploras, jen ŝi ĝemas,

'20 kaj se min en dormon lulis, sur
vang' ŝiaj larmoj rulis."